

Kulturaj Kajeroj

E.MAHÉ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1985 - 2


(APRILO - MAJO - JUNIO)

EN TIU NUMERO

vi povos legi pri...



Villandry kaj ĝiaj amĝardenoj...



Venenoj bestaj kaj vegetalaj

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Kuraro (S. Guillot)	3-4
Paĝo de la geknaboj (Audrey)	5
Villandry (S. Boniol)	6-8
Aventuroj de Fifi Stultul' (Mik)	8
Niaj literaturaj trezoroj(Le Puil)	9
La Monto Sankta Mikaelo(Maupassant) (tr. R. Dupuis)	10-11
Por via distro (C. Cavalié)	12
La vie de Grésillon	13-14
Gramatiko per bonhumoro(S. Guillot)	15

El Grésillon

La Ĝenerala Asembleo, kiu okazis la 31-an de marto, aprobis la diversajn raportojn prezentitajn. Tiuj raportoj montris, ke la nombro da ĉeestantoj en 1984 estis iom malpli granda ol tiu de 1983. Kompreneble, ĉar iom malkreskis la nombro da "tranoktadoj", ankaŭ malkreskis la enspezoj. Tio ne tre gravas sed, tamen, estas iom malkvietiga ĉar la elspezoj pri prizorgado konstante kreskas, ĉefe koncerne la riparojn. Ĉijare okazis ne-atenditaj elspezoj sufiĉe gravaj. Ni ne povas facile malaltigi la konstantajn elspezojn, kiuj estas jam kalkulitaj je minimuma nivelo, despli ke la administraj postenoj estas sensalajraj. Donacoj faritaj multe helpas sed ne sufiĉas por kovri la prizorgajn elspezojn pri la konstruaĵoj. Kelkajn riparojn ni ne povos prokrasti tre longtempe.

La Administra Konsilio poste kunvenis kaj povis konstati, ke, verŝajne, en 1985 la somersezono ne estos pli bona ol la antaŭa. Tamen estas necese, ke la enspezoj kresku, do, ke ankoraŭ pli da gesamideanoj vizitu la Esperanto-Domon. Konklude, al nia kutima reklamo vi devas aldoni vian. Reklamu en via Esperanto-grupo, en via urbo. Reklamu kiam vi skribas al korespondantoj, kiam vi parolas al amiko. Organizu esperantan-turisman vojaĝon de viaj samgrupanoj kaj amikoj; ankaŭ de la membroj de alia asocio aŭ grupo al kiu vi aliĝas. Ne forgesu, ke Grésillon troviĝas meze de regiono tre alloga kaj vizitinda. Ni estas pretaj helpi vin pri via grupvojaĝo per vizitprogramoj. Helpi nin vi povas ankaŭ skribante al ni pri kio vi ŝatus trovi en la programo de la aktivaĵoj de la Kultur-Domo. Ankaŭ tian helpon ni atendas.

****

La forpaso de Jean GUILLAUME surprizis ĉiujn. Vi jam legis pri lia granda laboro ĉe UEA kaj UFE. Nin afliktas ne nur la malapero de granda homo de la movado sed ĉefe la morto de amiko, amiko de nia Esperanto-Domo. Ni tutkore kaj plej amike salutas liajn edzinon kaj infanojn.

****

Esperanto tra la Mondo

POR LA 70-a UNIVERSALA KONGRESO

La Prezidento de FR Germanio, Dro Richard von Weizsàcker, akceptis la protekton de la kongreso. Inter la plurdeko da nomoj de personoj, kiuj eniris la Honoran Komitaton, estas la prezidento de la federacia parlamento, Ministro Genscher kaj aliaj eminentuloj.

...KAJ JAM POR PEKINO

Jam pluraj centoj da esperantistoj enskribiĝis kaj favoraj tarifoj por aliĝo validos ĝis la 15-a de aùgusto, en UEA. Oni daùre eldonadas en Ĉinio por la informo de la estontaj kongresanoj. Post "40 vidindaj lokoj en Ĉinio" kaj "Pitoreska Pekino", aperis "Albumo pri Ĉinio", kun multaj bildoj, kaj la legantoj de "El Popola Ĉinio" havis la plezuron trovi en la numero de aprilo grandan koloran mapon de la lando.

LA ESPERANTO-ELDONEJOJ EN ĈINIO

En la sama numero de "El Popola Ĉinio", oni trovas artikolon pri la laboro de la Ĉina Esperanto-eldonejo Oni tiel ekscias, ke de 1952 ĝis 1965, aperis 96 libroj aù broŝuroj, 175 de 1966 ĝis 1979. Poste, la eldona agado ankoraù pli ampleksiĝis kaj interalie aperas dekoj da miloj da lernolibroj kaj vortaroj. Krome, por UEA oni presigis en Ĉinio "Plena Analiza Gramatiko" kaj "Esperanta Antologio". Por kompletigi la jam aperinta "Ĉina Antologio" (1949-1959) oni nun planas samajn librojn por la periodoj 1919-1949 kaj 1960-1982, kaj eldonon de iuj sciencaj kaj teknikaj legaĵoj.

LA KASEDOJ EN KAJ PRI ESPERANTO

Por la esperantistoj kaj por la bibliotekoj de iliaj grupoj la kasedoj devas esti nun la nemalhavebla komplemento de la libroj. Pri muziko ekzemple, oni povas ofte trovi la diskon aù la kasedon de niaj talentaj kantistoj kaj kanzonistoj. Ankaù kun presita teksto. Ekzistas kasedoj pri interesaj prelegoj kaj debatoj kaj aliaj, kiuj kompletigas lernolibrojn. La franclingvanoj povas nun aĉeti de UFE malmultekostan kasedon kun informa teksto pri la lingvo kaj registradon de pluraj prelegoj faritaj dum la studtago en la Universitato Paris VIII. La libro-servo de S.A.T.-Amikaro proponas diverstemajn prelegojn de Claude Piron, M. Duc-Goninaz, Pierre Janton, Marjorie Boulton, k.t.p.

EN HINDA UNIO KRESKAS LA SEMO

Antaù kelkaj jaroj, kelkaj esperantistoj kreis la Esperanto-Federacion de Bharato (Hinda Unio). Komence de februaro ili aranĝis kongreson en Kalkuto. La ŝtatestro de Okcidenta Bengalio inaùguris la kunvenon. Gravaj ĵurnaloj raportis pri la kongreso kaj intelektuloj komencis lerni la lingvon. La estonta kongreso okazos en 1987, se eble en Nova Delhio.

KONGRESO KUN SIGNIFA REZOLUCIO

La nacia esperanto-kongreso de UFE okazis en Angers. La partoprenantoj unuanime akceptis rezolucion, kiu memorigas la ligon inter la esperanto-movado kaj la universala deklaracio pri homrajtoj, sekve ĝian opozicion al ĉiuj diskriminacioj. La rezolucic kondamnas la rasistajn atencojn.

S.A.T.-AMIKARO-KONGRESO

Tiu kongreso okazis en Saint-Nazaire, ankaù dum Pasko, kun cento da ĉeestantoj. Interalie la kongresanoj alportis subtenon al la samtempe okazanta manifestacio kontraù rasismo.

NOVAJ LIBROJ

"La mezepoka periodo", lasta volumo de la dulingva antologio: "Tra la parko de la franca poezio" de G. Waringhien. La kvar volumoj meritas eniri niajn bibliotekojn.

"Diskriminacio",prelegoj el la 65-a universala kongreso.

"Gerda malaperis!", lingva-instrua romaneto de C. Piron

"Jaŭto veturas for...", nova krimromano de Deck Dorval.

"La Monto" nova romano de I.Nemere.

"Sferoj 3; Scienfikcio kaj fantasto" Tria volumo de la serio sed kun nur verkojde diverslandaj esperantistoj

"Amuza matematiko por gelernantoj" de P. Arnaudov kaj L. Arnaudova.

"Laktisto de Mäekula", traduko de estona romano de Eduard Vilde.

"Programada teknologio", dek ses popularaj artikoloj pri la komputila programaro.

KURARO

- Venenoj bestaj kaj vegetalaj-

En la 16-a kaj 17-a jarcentoj, dum la malkovro de la Nova Mondo, post la vojaĝoj de Kristoforo Kolombo, la hispanaj konkerantoj kaj, pli poste, la misiistoj, la vojaĝantoj (hispanaj, portugalaj, holandaj, anglaj, francaj) renkontis indianajn tribojn, kiuj uzis venenojn por la fiŝkaptado, la ĉasado, la milito kaj la sorĉarto. Ekde la 16-a jarcento la misiistoj, kronikistoj longe parolis pri tiuj venenoj, miksante legendojn kaj realaĵojn. La indiĝenoj uzis la cerbatanon kun sagoj el palmoligno, el osto,aŭ iun rajospronon kies fajnaj dentaroj fiksiĝis en la vundo; la sagoj estis ŝmiritaj per venenaj sukoj aŭ graso, kiuj okazigis infekton kaj pusadon. Por ne vundi sin la indiĝenoj kovris la sagon per bambutubo. La Eŭropanoj ne konis kontraŭvenenojn; por sin protekti ili surmetis, malgraŭ la tropika klimato, dikajn jakojn, remburitajn per kotono; iliaj sandaloj havis tre dikajn plandumojn por eviti la sagojn dissemitajn laŭlonge de la vojstrekoj. La invadantoj rapide konis la venenojn por kapti fiŝojn, la halucinajn drogojn, kiujn uzis kuracistoj kaj sorĉistoj (yaghe, ayahuasco, nopo, kaktoj,meksika peyolt, halucinaj fungoj); la venenoj por ĉasado kaj milito pli longtempe gardis sian sekreton; la ĉasvenenoj agis rapide por tuj senmovigi la ĉasaĵon; la militvenenoj agis malrapide, sed senkompate: dum 24 horoj la vundito kruele suferis pro tremoj, konvulsioj, veraj rabiokrizoj, kaj mortis. La venena funkcio ekzistas ĉe bestoj, sed ne ĉe ĉiuj: neniu veneno ĉe birdoj; nur du specioj ĉe mamuloj: la ornitorinko, tiu vivanta fosilio aŭstralia, kaj la gracia soriko, la plej eta el la mamuloj. Pli riĉaj je veneno estas la senvertebruloj (urtikecaj raŭpoj, araneoj, serpentoj, formikoj).

En tiu 16-a jarcento, Pedro de Aguado la unua raportis pri veneno-preparado; jen lia recepto: "En malgrandan kuvon oni ĵetas venenajn serpentojn, ruĝajn formikojn, skorpiojn, urtikecajn raŭpojn, vilajn araneojn dikajn kiel ovoj, virinan menstruan sangon; oni fermas la poton; oni atendas ĝis ĉio, kio estis viva estas mortinta. Tiam oni aldonas la ŝviton de bufoj, tiel havigitan: en alian poton oni metas bufojn, kiujn oni fastigas dum kelkaj tagoj. Poste oni ligas la krurojn de la bestoj ĉe kvar stangetoj kaj per branĉetoj maljunulinoj vipas la bufojn, ĝis ili ŝvitas. Oni aldonas kelkajn laksigajn fruktojn, kaj de tempo al tempo, por riĉigi la tuton, la lakton de urtikecaj raŭpoj". Pedro aldonis, ke la maljunulinoj mortis pro la eliĝantaj vaporoj. Tamen, la hodiaŭaj observadoj montras, ke venenaj haladzoj ne eliĝas, kaj ne pro tio mortis la maljunulinoj. Fakte, ĉiuj venenoj estis detruitaj de la varmeco kaj de la putriĝo (escepte de la bufa veneno). En tiu malnova preparaĵo rolis nur la toksoj igitaj de la putrado, aganto de gangreno. Hodiaŭ, la veneno de la Granda Bufo (bufo marinus) estas ankoraŭ uzata post meĥanika ekscitado de la besto en laboratorio por okazigi ŝvitadon. Aliaj malgrandaj bufoj ankoraŭ eniras en la konsiston de ĉasveneno. Ankaŭ la beletaj etaj ranoj je vivaj koloroj. Tiu veneno de batrako, seka, konserviĝas dum pluraj jaroj; ĝi agas sur la nerva sistemo kaj la koro; birdo mortas en kelkaj minutoj, kapreolo, jaguaro en 10 aŭ 12 minutoj. Oni povas manĝi la ĉasaĵon: la dozoj de tiu veneno estas tro malgrandaj por ĝeni nian digeston! Fine de la 19-a jarcento, la Cosimas-tribo, kiu arigis ĉiujn individuojn elpelitajn el sia klano pro siaj aĉaĵoj, ŝtelis brutojn, ĉion rabis, kaj fabrikis tiujn venenojn, kiujn ili interŝanĝis kontraŭ katunoj aŭ "varas" (moneroj).

Inter la vegetaloj, la mancinelo ludis ĉefan rolon; ĝi apartenas al la familio de la eŭforbiacoj; ĝi estas malalta arbo, kiu kreskas prefere marborde sur la sablaj plaĝoj; ĝiaj trunko, radikoj, folioj, fruktoj, elŝvitas blankan latekson, ege toksan; ĝi estis la armilo kontraŭ Hispanoj kaj Inkaoj;ĝin uzis la militaj triboj, kiuj loĝis en la hodiaŭaj Kolombio, Venezuelo, Amazonio; pli norde ĝin uzis la Majaoj, uzado ankoraŭ efektiva en 1937 diras S-ro Soustelle. Aliaj eŭforbiacoj entenas mortigan venenon: la kaŭstika rezino de venena figarbo, la dika bulbo de kelkaj amarilidoj kaj la ligno de "iguirane".

La mancinela veneno estis pormilita armilo. Kontraù la ĉasaĵo la Indianaj ĉasistoj de la profundaj amazoniaj arbaroj, uzis la kuraron. Kroniko de 1598 ĝin mencias sub la nomo "yerba"; pli poste oni ĝin nomis "urari" kaj fine "kuraro". Estas diversaj kuraroj, laù la plantoj el kiuj oni ĝin eltiras, laù la preparmaniero, kiu varias laù la triboj. Tiu preparado ne plu estas propraĵo de la sorĉistoj; ankaù la ĉasistoj scias ĝin prepari per du ĉefaj plantoj al kiuj oni aldonasaliajn plantojn kaj bestojn venenajn. "Strychnos" estas la esenca elemento de la kuraro de Gvajano; estas lianoj aù arbustoj el la familio de la "legoniacoj". "Chondodendron" estas eltirita el la lianoj duraj kaj lignaj de la menispermacoj; tiuj lianoj, dikaj kiel boaoj, 25/30 metrojn altaj, grimpas ĝis la supro de la tropikaj arboj (la kuraro el la radikoj estas malpli efika). Post preparado, la kuraro ne ĉiam same prezentiĝas; oni metas ĝin en terpotojn, kiam ĝi estas seka, dura, nigraĉa; en kalabasojn aù bambutubojn, kiam ĝi estas pasteca; ĝi povas esti densa siropo ruĝbruna, senodora, amargusta (laùplaĉe oni povas gustumi ĝin, kondiĉe ke ne estas vundo en la buŝo!). Hodiaù la pakmaterialo modernigis: boteloj aù malnovaj ladskatoloj. La sago ŝmirita per kuraro endanĝerigas la vunditon. Li povas forkuri, sed rapide povas nek paroli, nek moviĝi, nek spiri. Li mortas. La agpovo de la ĉaskuraro dependas de ĝia freŝeco kaj de la pezo de la ĉasaĵo. Kelkfoje la Indianoj uzas maljuniĝintan kuraron por kapti bestojn, kapreolojn, pekariojn, diversajn birdojn, kiujn ili volas gardi, duondresitajn, ĉirkaù siaj kabanoj; tiukaze la paralizo rapide malaperas, ne tuŝinte la spirmuskolojn. Tiuj kaptitaj bestoj liveras nutraĵon, kiam necesas, kaj plumojn por la sagoj kaj diversaj ornamaĵoj. Tia kuraro ankaù servas al la sorĉisto por prepari sorĉaĵojn kaj amuletojn.

En la 18-a jarcento, Jose Gumila (1741), La Condamine, komisiita de la pariza Akademio de sciencoj (1746), Antonio de Ulloa, sendita de la Reĝo de Hispanio (1751), trairas la tropikan arbaron de Amazonio al Atlantiko. Ili kunportos Eùropon kurarajn provpecojn. Ili renkontas la tribon "Tikunas", kiu vendos kuraron dum unu jarcento al eùropaj laboratorioj fare de migraj fikomercistoj. En 1965, tiu tribo ankoraù estis tre multnombra en perua Amazonio.

La 19-a jarcento kondukas la naturalistojn sudameriken. Komence de tiu jarcento Humbold kaj Bombland trairas la tropikan riveregon Orinco, 3000 kilometrojn longa. Ili vidas ellabori la kuraron; tiu preparado estas sekreto, transdonita de patro al filo. En la misio Esmeralda, la Mastro de la Kuraro estas maljuna Indiano. La lianoj de "bejonco de mavacoure" estas freŝe tranĉitaj aù sekaj je kelkaj semajnoj; ili estas la bazo de la "Strychnos". Necesas grandaj argilaj kaldronoj por kuiri la vegetalajn sukojn, kaj malpli profundaj kaldronoj por forvaporiĝo. Por filtri oni uzas la funelon, pri kiu la maljunulo tre fieras: bananfolioj estas volvitaj, kiel korneto, kiu estas lokita en alian funelon el palmfolioj pli firmaj; malpeza skafaldo el palmaj petioloj kaj rakioj subtenas la tuton. Per tranĉilo, oni raspas la ŝelon de "macavoure"; oni ĝin dispremas per muelŝtono, same kiel por manioka faruno, ĝis oni havas fajnajn fibretojn. Tiu fibra maso iĝas flava. Oni ĝin metas en la funelon kaj oni verŝas akvon. Dum horoj kaj horoj la flavaĉa likvaĵo fluas gutope el la funelo. Estas la venena likvaĵo, kiun oni devas koncentri per forvaporiĝo en la larĝaj argilpotoj. Tiu koncentrita likvaĵo estas ankoraù tro fluida por firme adheri ĉe la sagoj. Tial oni aldonas alian vegetalan fibron tre viskozan, eltiritan el la arbo "kiricaguero". Oni boligas la tuton, kaj jen densa siropo simila je gudro. Gustumu: ĝi estas amara sed agrabla.

S. Guillot

(En la venonta numero vi povos legi: "Kuraro kaj moderna Scienco".)

)

PAĜO DE LA GEKNABOJ

Karaj geknaboj-gelegantoj,


Jen denove letero de Onklo Wre el Aùstralio. Bedaùrinde ĝi estas la lasta, kiun ni povas ricevi de li, ĉar la pasintan jaron, la 9-an de novembro, li mortis.

Kiam li naskiĝis, antaù preskaù 80 jaroj, li estis malforta bebo, kaj la kuracisto opiniis, ke li vivos maksimume kvin jarojn. Tamen la juna Wreford Chandler trovis vivon multe tro interesa por rezigni je ĝi tiom frue. Li volis scii ĉion pri la bestoj, la birdoj, la floroj, arboj, riveroj, pri ĉio en lia medio. Li ne havis tempon morti: li bezonis tempon por lerni pri ĉio ĉirkaù si. Morto devis atendi; do ĝi atendis.

Wre havis 12 jarojn kiam li hazarde trovis, en fruktokesto, lernolibron pri Esperanto. Li demandis al instruisto ĉu li iom scias pri Esperanto? La instruisto, eble pro laceco aù malbona humoro, mokis pri la Internacia Lingvo, kaj asertis, ke la angla sufiĉas. Tio tuj decidigis la knabon, nature ribeleman kaj obstinan, lerni Esperanton! Tion li faris unue sola kaj poste kun la skriba helpo de japana esperantisto kies adreson li trovis en la lernolibro.

Lia intereso pri la naturo kreskis kun li. Per Esperanto li amikiĝis kun homoj tra la tuta mondo. Pri plantoj kaj bestoj, kaj speciale pri la birdoj de sia lando, li fariĝis famkonata spertulo kaj multon pri ili li verkis en Esperanto. Li ŝategis vojaĝi. Ĉie kien li iris li studis la naturon. En la somero de 1979 li vizitis Grésillon:" Dum mia tuta Esperanto-vivo la plej ĝua sperto estas la ferio en Grésillon, ĉar Esperantujo estas Paradizo sur la Tero." Tre plaĉis al li verki leterojn por la "geknaboj de Kastelo Grezijono". En la lastaj jaroj li ne povis vojaĝi sed diris:" Dank'al Esperanto mi havis interesplenan vivon. Je amikeco mi estas pli riĉa ol milionulo."

Audrey



KUR-BU-RU LA KOALO

LEGENDO de la TRIBO KAMILAROJ

Foje en la tribo estis orfo. Li estis plorema knabo, kaj neniu amis lin. Li devis dormi sub la ĉielo kaj manĝi la postrestaĵojn kiam la aliaj infanoj jam finis manĝi. Oni eĉ ne permesis al li trinki el siaj "Tarnukoj". Li devis iri al la rivereto kaj trinki tie. Kiam li havis ses jarojn, okazis longa senpluvo kaj restis en la rivereto nur unu akvotruo. La tribanoj ne permesis al la kompatinda orfo trinki ĝis ĉiu alia havis sufiĉe da akvo. Tiam, kompreneble, la akvo estis malpura. Finfine la tuta tribo malsatis. La viroj eliris por ĉasi valabiojn, la virinoj kaj geknaboj eliris por elfosi miel-formikojn.



Neniu rimarkis, ke Kur-bu-ru restis en la kampadejo. Kiam la aliaj malaperis Kur-bu-ru iris al la lasta akvotruo kaj trinkis. Li fortrinkis la lastan guton. Kiam la virinoj kaj geknaboj revenis, ili soifis. Sed la akvotruo estis tute seka. Ili trovis nur la pied-signojn de Kur-bu-ru. Pro tio ili kruele batis la kompatindan orfon. Li ploregis kaj grimpis al la brancoj de la sole restanta arbo. Kiam revenis la ĉasistoj, tute sen viando, ili malsatis kaj soifis. Ili iris al la arbo por puni la orfon. La spirito de ties patrino ŝanĝis lin al besteto. Hodiaù la koalo loĝas en la arboj. Se homo minacas ĝin la besteto ploregas. Ĝi iras al la plej maldika fino de branĉo. La nomo "koalo" signifas "ne trinkas". Onklo Wre

Villandry,

DEIRPUNKTO POR REVADO

Mi pe tas vin, karaj gastoj en Grésillon, jes, mi eĉ vin petegas: nepre ne foriru ne veturinte - eĉ por duontago - al Villandry. Per plaĉa glata vojo ne tro trafikŝtopita vi ĝin atingos.

Sed kio estas Villandry? Ĝi estas kastelo: "jes unu plia", vi rebatos. Sed ĝi estas ankaŭ ĝardenoj, kaj ĝardenoj tiaspecaj konsistigas unikaĵon ne nur regionan sed landan.

Villandry situas precize 15 kilometrojn de Tours kaj je 9 kilometroj de Azay-le-Rideau. La kastelon konstruigis en 1536 Jean Le Breton, financministro sub Francisko la Unua (li jam estis la konstruiginto de la kastelo en Chambord). Eksambasadoro en Italujo, li tie lernis la ĝardenarton. Li tie lernis pri fontanoj kaj laŭboj; li tie lernis novajn modon kaj kutimon, nome kiel enmeti legombedojn inter vicojn da malaltaj buksoj, dum la tiamaj monaĥoj ilin ĉirkaŭis per nuraj aromkreskaĵoj. En Villandry, valeto de rojo trairita ebligas teras-ĝardenojn; tiel akordiĝas la itala gusto kun la franca emo aranĝi harmonie geometriajn strukturojn, kies proporcioj kaj interrilatoj plene ĝuigas ambaŭ rigardon kaj menson. Ĉi-loke do trinivelaj aperas la ĝardenoj. Ĉe la supro spegule rebrilas milda akvoloko, la necesan akvoprovizon al la tuto liveranta. Meze, jen la plezurĝardenoj , samnivele kiel la kastelaj salonoj. Pli malsupre, apudante la kromkonstruaĵojn, etendiĝas la ornama legomĝardeno. Ĉiu ĝardenospeco estas ĉirkaŭita kaj superstarita de aleo - verdajkvazaŭklostroj el volbe pritonditaj tilioj kaj vitlaŭboj. Per tia aranĝo tuj praviĝas jena konsilo: ĝardenojn desupre malsupren ĝue rigardu, ŝirmite kontraŭ la sunradioj. Kaj en Villandry tia ĝua superrigardo trafos perfektan kuniĝon de ĉio bezonata, ĉu por materiala, ĉu por spirita vivo, insertiĝanta en ielan juvelujon inter kastelo, vilaĝo kaj kamparo.

Dekomence ni "sekvu nian nazon", nian sciavidon, kiu nin tiras al la legomĝardenoj. Ĉu renesanca novaĵo? Ne: jam mezepoka elpensaĵo. En la tiutempaj miniaturoj admireblas desegnaĵoj de la monaĥaj kopiistoj perlegome faritaj; kaj la tigrozujo prezentis simbolan bildon de l'monaĥo la ĝardenon kultivanta.

En Villandry, ĉi malsupre, nur legomoj kaj fruktoarboj kun kelkaj florspecioj, ornamocele. Sed kial do plantadi legomojn tiel proksime al la kastelo? Ĉu en tio kuŝas misgustaĵo? Tute ne. Ĉu nuntempe ni primokas homojn, kiuj ameme strebas aklimatigi avokadujojn aŭ bananujojn? Jam same okazis dum la XVI-a jarcento, ĉar el Ameriko envenis multaj novaj legomspecioj. Tial la posedanto deziris propraokule ilin kovi kaj pro fiero ilin elmeti sub la okuloj de siaj miroplenaj gastoj.

Antaŭ ni disvolviĝadas en sendifekta kunordigo egaldimensiaj kvadratoj per larĝaj aleoj malkunigitaj. Je la interkruciĝa punkto profiliĝas akvobaseno de kvar roz- kaj jasmenlaŭboj ĉirkaŭita. En ĉiu kvadrato videblas: centre, staranta fontano, kie la ĝardenisto laŭbezone plenigas sian verŝilon, interne, malaltaj buksoj geometriajn figurojn naskantaj kaj la bedoj difinantaj. La aleoj 80-centimetrojn larĝaj estas surŝutitaj per la fajna Loire-sablo. La limon de ĉiu kvadrato signas kverka latreto, sur kiu onde verdas pom- kaj pirarbaj branĉoj horizontale pritonditaj, dum ambaŭflanke de la kvadrataj enirejoj rektiĝas ŝpinbastonaj branĉofiguroj je homstaturo altaj. Konture belas la desegnaĵoj en ĉiuj kvadratoj malsimilaj kaj malsamkoloraj: ĉi tie jade verdas la karotaj falfolioj; tie bluadas brasikoj kaj poreoj; aliloke ruĝas la betoj dum subokule gaje buntas la damtabuloj. Kaj jen divenu: ĉu vi konas la devenon de la tielnomataj "romaj laktukoj"? Ili originas de la laktukoj kulturitaj en Villandry pli belaj ol la aliĝardenaj - ili eĉ naskis enviosenton ĉe iu Moŝta prelato, kardinalo en Aragono en la jaro 1570-a.

Nun ni levu nin sur la mezan nivelon kaj transiru al la plezurĝardenoj, al la amĝardenoj. Jen altaj buksomasivoj, malhelverdaj taksusoj, floroj. Sur la ĉekastela parto pompas tulipoj kaj dalioj dum modestas neforgesuminoj; aliflanke regas la staŭdoj: aromaj, ornamaj kaj medicinaj. Jen lavendo, iridoj,verbeno, majorano kaj timiano. Sed la ĉefa vidindaĵo senkonteste estas la rafinita simboliko de la plantkvadratoj. Kvarope ili prezentas la diversajn fazojn, aŭ specojn, de amosento.

- Sud-oriente tragikan amon elvokas ponardoj, glavoj kaj klingoj; kaj sangon sugestas la ruĝa tonalo;
- Nord-oriente adultan amon simbolas kornoj kaj ventumiloj. Centre de la kvadrato kaŝiĝas ambiletoj. Kaj kompreneble nur flavi povas tia loko...;
-Sud-okcidente amon teneran signas koroj per flamoj disigitaj. En la mezo videblas maskoj ebligantaj aùdacajn amvortojn subŝirme de anonimeco;
- Norde la turmentoj de ampasio manifestiĝas pere de krevitaj koroj.

Plilongigonte la amĝardenojn masivoj prezentas la figurojn de langvedoka, vaska kaj malta krucoj.

Kiel dirite ni retroiris al la XVI-a jarcento. Tamen per fulma veturado sur la facilaj flugiloj de l'tempo, ni estas nun atingintaj la XVII-an jarcenton kaj ties unuan duonon travivantaj. Kial? Nu, pri tia magiaĵo kulpas tiuj floroj, kiuj antaùanoncas la famkonatan "Girlando(n) de Julia"; kulpas la simboliko de la amkvadratoj, kiuj nin abrupte ĵetas en la preciozan etoson. Sed kio vere estas preciozeco?

La precioza spirito konsistas el strebado al distingiteco sub ĉiaj ajn formoj. Ĝi esprimas la idealismon de socia elito, heroismon alte taksanta kaj amon diiganta. Cetere ĉu en tio ne kuŝas la daùrigo de la galanta amo XII-jarcenta? Sed la precioza sentmaniero ne estas franca propraĵo. Ĝi ankaù konstateblas en Anglujo, Hispanujo kaj Italujo (oni interalie menciu la nomon de la fama poeto Marino Marini, aùtoro de la pastoralo "Adone", verko plena je spritaĵoj kaj pintumoj). La preciozulinoj estas mondumaninoj, kiuj donas la tonon kaj laùdifine de Abato de Pure," sin suprentiras el la komuna nivelo". Fakte la preciozuloj stamfas antaù la trivialaj vivrealaĵoj kaj povas iĝi ridindaj, kiam ilia strebado al nepra distingiteco ĉesas esti natura, kiam ili konfuzas delikatemon kaj ekstravagancon, kiam ekzemple la burĝoj ludas afekton.

Preciozemon oni tuj rimarkas en la vestaranĝo: raraj parfumoj estas uzataj, eleganteco kuŝas en la elekto de plumoj kaj gantoj; Rubandofaskoj kaj puntaĵoj ornamas la kulotojn. Montra ĝentileco pompas en la esprimmaniero. La stilo siaflanke estas ne nur gramatike pura, sed kreiĝas iaspeca ĵargono; tial, ke en 1661 Somaize publikigas sian "Granda(n) Vortaro(n)", kiu liveras "la ŝlosilon de la lingvo uzata en la murlitaj interspacoj", nome la ĉiutagan vorton kaj ties tradukon en preciozan lingvon. La verkoj svarmas je troigaĵoj, ĉirkaùfrazoj, metaforoj kaj pintumoj. Jen kelkaj ekzemploj: la amatino "malheligas la sunlumon per la brilo de siaj okuloj"; la vangoj estas "la tronoj de l'pudoro"; la peruko estas "la juneco de l'maljunuloj", kaj la spegulo " la logokonsilanto". La atenton oni emas piki, ĉu per antitezo, ĉu per kalemburo. Sed antaù ĉio oni klopodu elpensi galantan frazaranĝon. Pintumojn oni frandas. Ilin jene difinas la "Vortaro de l'Akademio" :"Ia penso, kiu surprizas, ĉu per subtila fantaziaĵo, ĉur per vortludo". Estas laùguste troigi malgravaĵojn (per aldonado de tiaj adverboj, kiaj "furioze", "terure", eĉ "terurege" kaj piruete ŝerci pri la gravaj aferoj. Mallonga citaĵo ilustros la tiaman stilon. Temas pri dankletero, kiun Guez de Balzac, lerte sprita leterverkisto, sendis al kuzo pavojn al li donacinta: "Ĉar nek miaj okuloj, nek mia animo estas avaraj, la smeraldojn de viaj pavoj same multvaloraj mi taksas, kiel tiuj de la gemistoj". Baladojn, rondaùojn, stancojn, sonetojn kanzonojn, epigramojn, madrigalojn, galantajn komplimentojn, unuvorte la malĉefajn ĝenrojn prefere kultivas la poetoj, kiuj uzante la retorikajn artifikojn, "mortiĝas pro amo...".

Ĉar plejunue oni emfazas la sentorafinitecon. Nur malŝaton kaj malestimon al la materio oni elmontras. El tia konceptaro fontas la precioza amkodo. de reciproka estimo naskita, nur noblajn animojn amo povas kunigi; kaj nur platona ĝi povas esti. Se karna ĝi iĝus, la geamantoj malnobliĝus kaj defalus. Por amon ludi oni estas devigata restadi en ĉiuj vilaĝoj de la "mapo de l'tenero", gradigitaj ambaùborde de la rivero Inklino, inter la Lago de Malŝato kaj la Maro de Malamikeco, antaù ol albordigi ĉe la Danĝera Maro kaj atingi la Nekonatajn terojn.


Tamen spite de nokontesteblaj troigoj la precioza spirito profite influis nian literaturon per lingvo-purigo kaj forigo de multnombraj pedantaĵoj latin- kaj grekdevenaj. Ĝi ne malmulte kontribuis al forĝado de nia klasika lingvo, tute taŭga por fajne nuancigi la komplikaĵojn de la hompsika analizo.

Dum la unua duono de la XVII-jarcento tiun laŭdindan influon oni ĉefe ŝuldas al la Hotelo de Rambouillet, kies pordoj malfermiĝis en 1605, kaj al la tiel-nomataj "murlitaj interspacoj" (tiu duvortaĵo signas la parton de la dormoĉambro, kie la altrangulinoj akceptas siajn gastojn). La "Hotelon" sur strato Siant-Thomas-du-Louvre ni vizitu niavice. La tiea estrino nomiĝas Catherine de Vivonne, markizino de Rambouillet; ŝiaj admirantoj ŝin alnomas laŭ la tiutempa modo "la senkompara Arthénice". Fakte eminenta virino estas ŝi. Bela, klera kvankam ne pedanta, virta kvankam ne pruda. Ŝi volas kontraŭi la troliberecon de la moroj kaj la kortegan krudecon. En la luksa, vate intima etoso de la "blua ĉambro" la surlite kuŝanta markizino akceptas la socian eliton kaj ĉefe verkistojn. Post nelonge ankaŭ ĉeestos ŝiaj du filinoj: Julie d'Angennes kaj Angélique. Ĝis 1630 la Bluan Ĉambron vizitadas Richelieu, Malherbe, Vaugelas Voiture. La jaroj inter 1630 ĝis 1645 estas glore apogeaj. La famo tien tiras novajn gastojn. Ni menciu la nomojn de la duko de Enghien (estonte la Granda Condé), la Duko de Marcillac (estonte duko de La Rochefoucauld famiĝonta pro siaj maksimoj), la duko de Montausier, fraŭlino de Scudery. Intermite venas Rotrou, Corneille, Scarron, Balzac. Sed depost 1645, kvankam S-ino de Sévigné estas la klerulan rondon enveninta, ekbatas la horo de l'subiro. Julia, post 14 jaroj da galantaĵoj kaj amsopiroj fare de Montausier estas finfine edziniĝonta je li, ŝia fratino Angélique siaflanke edziniĝos kaj la markizino retiriĝos.

S. Boniol

(daŭrigota)

LA AVENTUROJ DE FIFI STULTUL



PRI NIAJ LITERATURAJ TREZOROJ

REELDONOJ

Karaj KK-anoj, bonan tagon, matenon aù vesperon, elektu mem. Jen la dua jaro de tiu rubriko, aù pli modeste, la kvina artikolo de tiu serio. Eksciu, ke eĉ "Heroldo" mencias la artikolon de JP Danvy pri Grabowski!

En KK 84/2, mi skribis "... fine, mi esperas, ke dank'al tiuj rubrikoj, ni povos instigi eldonistojn reeldoni niajn trezorojn, kaj tie mi pensas ne nur pri originalaĵoj sed ankaù pri mondkonataj libroj, kiel "Tri homoj en Boato", "Natan la Saĝulo", k.m.a., kies traduko estas unuaranga". Tial, mi ege ĝojas konstati, ke lasttempe pluraj "trezoroj" estas reeldonitaj, kiel "Virineto en bluo kaj aliaj rakontoj" de Mason Stuttard (1946) kaj "Sep vangofrapoj" de Kàroly Aszlànyi (1943) en traduko de Laszlo Somlai (en la eldono de 1943 la nomo de la tradukinto estas Ladislao Spierer, fakte pseùdonimo de Somlai).

Malgraù tiuj iniciatoj, ĉefverkoj restas tute ne akireblaj (krom en bibliotekoj, feliĉe) aù bezonas minimume pli taùgan vestadon; mi pensas ĉi tie pri tiu finna epopeo (aù proza eposo?!) "La sep fratoj" de Aleksis Kivi, kiun eldonis Vilho Setälä en 1947, en la traduko de Ilmari Ekström. Per tiu "Granda Romano" (1870), vi plej certe eniros




la animon de la finna popolo kaj longe revos pri la vastegaj herbejoj, montaroj kaj arbaroj de tiu sovaĝa lando. Vi estos ensorĉitaj de tiuj sep fratoj, batalemaj, ribelemaj, duoncivilizitaj, kiuj forfuĝas por ne lerni alfabeton, sed kiuj fine scios legi la Biblion kaj kapablos plej ĝentile rilati kun siaj samvilaĝanoj. Fantazio kaj eĉ burlesko ne mankas en tiu kaptoplena rakonto. Mi, dum tuta legado, daùre aùdis viglan muzikon kaj vidis la sep fratojn danci, kuregi, saltadi, batali, petoli, laù ritmo de iu "West Side Story" aù alia holivuda filmo. Aĥ! se Kivi estus usonano, mi ne dubas, ke jam pluraj versioj - filmaj - ekzistus; sed, kiu interesiĝas pri tiel izolita popolo? Vi! do, tuj mendu tiun libron daùre (por kiom da tempo?) aĉeteblan por malpli ol 10 guld. en la libro-servo de UEA.

Pri "Tri homoj en boato" de la brita humuristo J.K. Jerome (tradukis G. Badash, 1935), vi devos snepulvorigi vian lokan bibliotekon. Laùdire, humuro ne estas internacia - povas esti. Laùdire, brita humuro estas tre specifa - tio ja estas, kaj tian specifecon mi plej ŝatas. Feliĉe, ke mi ne legis romanon en aùtobuso aù trajno... rideksplodojn mi ne estus povinta subpremi, kaj tio tute ne aspektas serioza! Se vi opinias, ke pri fromaĝo, kiu tro forte odoras kaj, kiun oni provas malaperigi, verkisto kapablas nigrigi paĝojn, kuru do al la biblioteko aù/kaj amase skribu al eldonistoj postulante tujan reeldonon de tiu juvelo. G. Badash ankaù tradukis "La Princo kaj Betty" de P.G. Wodehouse alia brita humuristo. Mi ja scias, ke ne ĉiuj tradukoj estis (as...) perfektaj. Sed multaj estas tutsimple "plibonigeblaj" kaj mi volas ĉi tie mencii la laùdindan iniciaton de UFE, kiu eldonis antologieton de la franca literaturo en esperanto.

Esperantistoj kutimas trumpeti, ke ĉiuj mondaj verkoj estas tradukitaj esperanten. Ne nur tio estas troigo, sed oni devas konscii, ke dekoj da ili tute ne plu estas akireblaj. Mi ja scias, ke estas pli facile eldoni poŝtkartojn ol librojn, sed jam kelkaj pruvis, ke ambaù eblas samtempe.

Jak LE PUIL



Mi vidis ĝin unue el Cancale, tiun feinokastelon kvazaù plantitan en la maro. Mi vidis ĝin malprecize kiel grizan ombron starantan en la nebula ĉielo. Mi ĝin revidis el Avranches ĉe la sunsubiro. La vastega sablejo estis ruĝa, la horizonto estis ruĝa, la tuta ekstermezura golfo estis ruĝa; nur la kruta abatejo konstruita tie malproksime de la kontinento kvazaù fantazia nobelkastelo mireginda kiel sonĝpalaco, neimageble stranga kaj bela, restis preskaù nigra tra la purpuraj nuancoj de l'mortanta tago.

Mi iris al ĝi jam ĉe la tagiĝo la morgaùan tagon, marŝante nur tra la sabla ebenaĵo, streĉe rigardante tiun monstran juvelon same grandan kiel montaro, ĉizitan kiel kameo kaj vaporan kiel muslino. Ju pli mi alproksimiĝis, des pli mi sentis min transportata de admiro, ĉar nenio en la mondo eble estas pli perfekta kaj pli eksterordinara. Kaj mi vagis surprizite, kvazaù mi malkovris dian loĝejon, tra tiuj ĉambregoj portataj de kolonoj jen pezaj, jen gracilaj, tra la koridoroj skulptitaj kiel puntaĵoj, kaj mi levis miajn mirigitajn okulojn al tiuj pintaj turetoj, kiuj similas raketojn direktitajn al la ĉielo kaj al tiu tuta nekredebla miksaĵo de tureţoj, gargojloj, graciaj kaj ĉarmaj ornamaĵoj, ŝtona piroteknikaĵo, granita punto, kolosa kaj delikata majstroverko arĥitektura. Ĉar mi restis en ekstazo, alvenis kamparano de l'Malsupra Normandio, kiu rakontis al mi la historion pri la granda kverelo de Sankta-Mikaelo kun la Diablo.

Ĉiu vilaĝo de Francujo estas metita sub la patronecon de protektanta sanktulo modifita laù la karaktero de la enloĝantoj. Tiamaniere Sankta-Mikaelo gardadas la Malsupran Normandion, Sankta-Mikaelo, la radianta kaj glora anĝelo, la glavbatalanto, la ĉiela heroo, la triumfanto, la vekinto de Satano. Sed jen kiel la sudnormando, ruza, insida, malica kaj ĉikanema, komprenas kaj rakontas la luktadon de l'granda sanktulo kontraù la Diablo.

Por ŝirmi sin kontraù la fiagoj de sia demona najbaro, Sankta-Mikaelo konstruis mem meze de la Oceano tiun loĝejon indan al ĉefanĝelo; kaj efektive, nur tia sanktulo povis fari al si tiel grandiozan restadejon. Sed ĉar li ankoraù timis, ke la Maliculo alproksimiĝos, li ĉirkaùigis sian bienon per moviĝantaj sabloj, pli perfidaj ol la maro. La Diablo loĝis en humila pajlokovrita domo sur la marbordo; sed li posedis la herbejojn baniĝantajn en sala akvo, la belajn grasajn terojn, kie kreskas pezaj produktoj, ĉiujn riĉajn valojn kaj fekundajn montetojn de la regiono, dum la sanktulo regadis nur sur la sablejo. Sekve de tio Satano estis riĉa kaj Santa-Mikaelo estis same malriĉa kiel ĉifonulo.

Post kelkaj jaroj da fastado la sanktulo enuis pro tiu situacio kaj deziris fari kompromison kun la Diablo, sed la afero ne estis facila ĉar Satano amis siajn rikoltaĵojn. Li pripensis dum ses monatoj; kaj iun matenon li piediris al la kontinento. La demono manĝis la supon antaù sia pordo, kiam li ekvidis la sanktulon; tuj li rapidis al li renkonte, kisis la malsupron de lia maniko, igis lin eniri kaj proponis al li refreŝigan trinkaĵon. Post kiam li trinkis tasegon da lakto, Santa-Mikaelo ekparolis:" Mi venis por proponi al vi bonan aferon."

La Diablo, naiva kaj bonfida, respondis:" Plaĉas al mi." -
" Jen. Vi cedu al mi ĉiujn viajn terojn." Satano, maltrankviliĝinte, volis paroli:" Sed...". La sanktulo daùrigis:" Unue, aùskultu. Vi cedu al mi ĉiujn viajn terojn. Mi prizorgos ilian bonstaton, la kamplaborojn, la plugadon, la semadon, la sterkadon, unuvorte ĉion, kaj ni dividos la rikolton en du egalajn partojn. Ĉu bone?". La Diablo, nature maldiligenta, konsentis. Li petis nur krome, kelkajn el tiuj bongustegaj trigloj, kiujn oni kaptas ĉirkaù la soleca monto. Sankta-Mikaelo promesis la fiŝojn. Ili frapis reciproke en siaj manoj, kraĉis flanken por sigeli la faritan araĝon kaj la

sanktulo daùrigis:" Vidu, mi ne volas, ke vi trovu kaùzon por plendi pri mi. Elektu tion, kion vi preferas; ĉu la parton de la rikoltoj, kiu estos ekster la tero, aù tiun, kiu restos en la tero". Satano ekkriis: " Mi prenos tiun, kiu estos ekster la tero". "Konsentite", diris la sanktulo. Kaj li foriris.

Sed, jen ses monatojn poste, en la grandega bieno de la Diablo oni vidis nur karotojn, napojn, bulbojn, skorzonerojn, tiajn plantojn, kies grasaj radikoj estas bonaj kaj ĝuigaj kaj kies senutila foliaro apenaù utilas por nutri la bestojn. Satano ricevis nenion kaj volis rompi la kontrakton, nomante Sanktan-Mikaelon "maliculo". Sed la sanktulo havis grandan ŝaton al kulturado; lifaris novan viziton al la Diablo: " Mi certigas al vi, ke mi tute ne pensis pri tio; okazis hazarde; ne estas mia kulpo. Tamen por kompensi vian malprofiton, mi proponas, ke vi ricevu en tiu ĉi jaro ĉion, kio troviĝos en la tero." " Plaĉas al mi," diris Satano.

En la sekva printempo la tuta surfaco de l'teroj apartenantaj al la Malica Spirito estis kovrata de belegaj grenspecoj, avenoj same grandaj, kiel pintaj turetoj, linoj, bonegaj kolzoj, ruĝaj trifolioj, pizoj, brasikoj, artiŝokoj, kaj de ĉio alia, kio kreskas sub la suno, kun grajnoj aù fruktoj. Satano ankoraùfoje ricevis nenion kaj tute malkontentiĝis. Li reprenis siajn herbejojn kaj plugejojn kaj restis surda al ĉiu nova proponklopodo de sia najbaro.

Unu tuta jaro pasis. De l'supro de sia izolita nobel-kastelo Sankta-Mikaelo rigardadis la malproksiman kaj fekundan teron kaj vidis la Diablon gvidi la laborojn, enporti la rikoltojn, draŝi sian grenon. Kaj loi furiozegis kolerante pro sia malpotenco. Ne povante plu trompi Satanon li decidis venĝi sin kaj li revizitis lin, petante, ke li venu por tagmanĝi la postan lundon. " Vi ne havis bonŝancon en viaj aferoj kun mi," li diris, "mi scias tion; sed mi ne volas, ke restu venĝemo inter ni, kaj mi kalkulas, ke vi venos por intima tagmanĝo. Mi regalos vin per bongustaĵoj. Satano, same manĝegema kiel maldiligenta, tuj konsentis. En la difinita tago li vestis sin per sia plej bela vesto kaj iris al la Monto. Sankta-Mikaelo lin eksidigis ĉe sia belega tablo. Oni prezentis unue volovanon plenan je kokaj krestoj kaj testikoj kun buletoj de kolbasaĵo kaj du grandajn triglojn kun kremo; post tio meleagron en vino, plenan de konfititaj kaŝtanoj, poste ŝaffemuraĵon same bongustan kiel kuko; post tio legomojn, kiuj tuj fandiĝis en la buŝo, kaj fine bonan varman platkukon, kiu fumis eligante buteran parfumon. Oni trinkis puran cidron ŝaùmantan kaj sukeran, kaj vinon ruĝan kaj ebriigan, kaj post ĉiu plado oni oni trinkis malnovan pombrandon. La Diablo trinkis kaj manĝis kiel kofro, tiom kaj tiel, ke li eksentis ĝenon. Tiam Sankta-Mikaelo leviĝinte ekkriis potence kun tondra voĉo: "Ĉu...antaù mi, antaù mi,kanajlo, vi tiel kondutas...antaù mi...?" Satano terurita ekfuĝis kaj la sanktulo kaptinte bastonon postsekvis.

Ili kuris tra la malaltaj haloj turniĝante ĉirkaù la kolonoj, supreniris la subĉielajn ŝtuparojn, galopis laùlonge de l'kornicoj, saltis de gargojlo al gargojlo. La kompatinda demono korŝire malsana forkuris, malpurigante la loĝejon de la sanktulo Li troviĝis fine sur la lasta teraso, de kie oni vidas la tutan grandegan golfon kun ĝiaj paŝtejoj. Li ne plu povis eskapi; tiam la sanktulo, donante al lia postaĵo furiozan piedfrapon elpelis lin kiel pilkon tra la spaco. Li glitflugis tra la ĉielo kaj peze falis antaù la urbo Mortain. La kornoj de lia frunto kaj la ungegoj de liaj membroj eniris profunde en la rokon, kiu konservas poreterne la postsignojn de tiu satana falo. Li reveliĝis lama kaj misforma, kia li restos ĝis la fino de la tempo; kaj vidante la fatalan Monton li bone komprenis, ke li ĉiam estos venkata en tiu malfavora luktado, kaj li foriris forlasante al la malamiko siajn kampojn kaj paŝtejojn.

Jen kiel Sabkta-Mikaelo, patrono de la normandoj, venkis la Diablon.

el "Normandaj Rakontoj"(tr. R. DUPUIS)

POR VIA DISTRO


NOVA PROBLEMO

Vi devas trovi frazon eltiritan el tre konata verko. Tiu frazo aperos en la horizontala krado. La vortoj de tiu frazo estas konstruotaj per literoj de la vertikala krado. Ĉiu linio de tiu vertikala krado konsistas el vorto, kies difino aperas sur la sama horizontala linio. Sur linio A la unua difinó korespondas al seplitera vorto. Ĉiu litero de la vorto estu transskribita en la korespondan kvadraton de la horizontala krado; ekz.: la unua litero de la vorto de linio A ricevis la numeron 52; vi transkribas tiun literon en la kvadrato A52 de la horizontala krado. Indikoj pri la aùtoro kaj verko aperas pere de la vertikala sinsekvo de la unua litero de la vortoj: A52, B17, C20,.....

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO :

VORTOJ TROVOTAJ : fari, bari, bori, boli, roli, rolo, rodo, nodo, nomo, komo, koto, roto, rito, rizo, pizo, piro, paro, pano, rano, sano, saĝo, saĝa, sala, sama, iama, lama, laca, lace, pace, paco.

A	Provizi libron per tabelo laù alfabeta ordo	52 4 140 32 161 61 3
B	La Biblio admonas nin prezenti la duan	47 72 101 16 47 8
C	Rilata al la loko, kie leviĝas la suno	20 39 14 56 159 103 56
Ĉ	Iun tagon	121 163 15 89 49 89
D	Ne malpli ol	97 1 130 27 109 138 145
E	Rilata al klaùno, histriono	154 146 50 151 107 141
F	Subite posedis	83 28 46 118 112 178 134
G	Do, la taglumo foriĝis	33 18 129 85 12 114
Ĝ	Translokiĝanta sur la akvo	82 2 74 98 168 90 102
H	Ne havanta akvon (faka termino)	149 55 110 122 152 41 149
Ĥ	Laù gvidilo de konduto	67 165 85 40 43 86
I	Kiel klakadis la cikonio en fabelo de Andersen	95 59 162 19 75 106
J	Do, la mallumo de la nokto foriĝas	135 72 124 38 131 136 157
Ĵ	Havas motivon por supozi	167 94 116 39 11 36 110
K	Strange ŝanĝiĝas dank'al F. Szilagyi en fabeleto	156 42 98 88 89 101
L	In ter la malsupro de la ventro kaj la femuro (sen finaĵo)	84 99 148 125 58 164
M	Malmultaj	166 155 146 54 109 119
N	Gi staras apud la vinagrujo sur la manĝotablo	158 13 153 104 54 126
O	Proksimume en la tempo de	115 71 105 77 65 139
P	La malo de posten	92 64 80 24 66 151 143
R	Ekzercus la kapablon, per kiu oni formas ideojn	26 6 128 137 117 93
S	Kiel oni petegas	75 31 89 61 73 5 147
Ŝ	Persista, tenema	150 68 135 60 70 111
T	Ekmalkombiniĝi, se paroli pri grasoj	7 45 67 96 63 171 128
U	Respekte honoras, precipe per oferprezento	160 48 9 62 129 69
Ŭ	Ampleks', grandec'	24 113 23 142 100 10
V	Loĝata de feliĉuloj en pesimisma romana de Strindberg	132 76 25 53 44 38



LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Assemblée Générale - 31 mars 1985-

La séance est ouverte à 10 h. Monsieur Watier est élu président de séance. 289 membres sont présents ou représentés. Le quorum est atteint.

Le trésorier présente le rapport financier et commente les chiffres. Il constate une assez forte baisse des recettes dûe en grande partie à une diminution du nombre des nuitées. La durée moyenne de séjour par personne est en diminution. Il y a également une baisse des recettes annexes, librairie, souvenirs coupons. Seul le chapitre "activités Culturelle" est en augmentation, grâce surtout au club photo.

Les dépenses d'alimentation sont sensiblement les mêmes que l'an dernier. Si le chapitre "salaires" est en forte augmentation cela est dû à l'absence, pendant quatre mois, du jardinier, malade. Les impôts et assurances sont en augmentation de 12%. La dépense "electricité-chauffage" en forte progression (23%) se ressent d'un décalage des achats de fuel qui peuvent être reportés d'une année sur l'autre. Il convient aussi de déduire le remboursement des frais de chauffage de Louis-Nicolas Babin (3000f). L'augmentation des frais d'entretien vient de réparations de toitures et du colmatage de l'étang. De gros investissements ont été faits pour le logement "jardinier" et le chauffage. La forte dépense "publicité" est imputable surtout au soutien à "Kulturaj Kajeroj". A partir de 1985 la revue sera imprimée avec les moyens propres et la dépense devrait être réduite d'environ 50%. Les dons sont en progression car à la suite de l'appel lancé au sujet des "sociétaires disparus" un certain nombre de parts ont été transformées en dons. Une partie des prêts "service d'eau" ont été également transformés en dons. Le capital social souscrit en 1984 est de 8 300 f. Le nombre de sociétaires a augmenté de 30 nouveaux et diminué de 25 départs.

Malgré les efforts de propagande, les candidats au bénéfice de la Fondation Belbona Espero sont peu nombreux. La fondatrice propose la parution d'un article convaincant dans Kulturaj Kajeroj et de continuer à contacter les organisations étrangères. Elle propose aussi de faire bénéficier de jeunes français de cette aide pour des séjours à l'étranger. Les commissaires aux comptes, MM Cortès et Lafargue sont renouvelés dans leurs fonctions pour 1985.

Avant de clôturer la séance le président fait part des décès récents de Henri Benaîm et Jean Guillaume. L'assemblée s'associe aux condoléances adressées par le président au nom du Conseil d'Administration.

La séance est levée à 12h 30.

Le secrétaire: Guy Dairon

****

Conseil d'Administration -

La réunion débute à 14h.30. Le président fait le point sur la situation du jardinier. M. Legros est déclaré en invalidité avec possibilité de travailler. Les conditions d'une reprise éventuelle n'étant pas précisées contact sera pris avec la Mutualité Sociale Agricole. Selon la décision du Conseil à sa réunion extraordinaire

du 2 décembre l'embauche de L.N. Babin au ler avril est confirmée, une décision le concernant devant être prise à l'automne.

Les stages d'été s'annoncent, quant au nombre de participants comme ceux de l'an dernier. Il est cependant bien tôt pour faire des pronostics sur la fréquentation en août. Les activités sont au point sauf pour le 2ème stage de juillet pour lequel il manque un professeur. Le 9 avril l'excursion du congrès d'UFE s'arrêtera pour un repas au château. Un passage est prévu pour la week-end de la Pentecôte. En mai et juin deux stages de travail sont organisés par la Direction de l'Equipement.

Le ruisseau l'Altrée a été nettoyé ce qui permettra un meilleur accès à la peupleraie. L'évacuation des eaux usées pose des problèmes sérieux qu'il faudra régler sans doute rapidement. Deux décisions sont prises: L.N. Babin ayant bientôt un logement à St Martin une compensation aux avantages en nature (logement, électricité) lui sera versée sous forme d'une augmentation du coéfficient du SMIC. D'autre part la MCE mettra, dans les années à venir, davantage l'accent sur l'aspect touristique des séjours à Grésillon.

Le président annonce qu'il a pris contact avec W. Auld pour une participation de ce dernier aux conférences en 1986. Il rappelle ensuite qu'il désirerait partager une partie de ses responsabilités avec quelques amis. Bien que son précédent appel, écrit, n'ait eu que peu d'echo il en lance un nouveau.

La séance est levée à 16h 30.

Le secrétaire: Guy Dairon

****

Inter Ni

Okaze de la jara Ĝenerala Kunveno, kiu okazis la 31-an de marto, la raportojantaŭe senditaj al ĉiu membro estis komentitaj. La nombro da ĉeesto-tagoj en 1984 estis malpli alta ol en 1983 kaj ankaŭ la enspezoj. La salajro-elspezoj multe kreskis ĉefe pro tio ke, en 1983, la ĝardenisto ne laboris kaj ne estis salajrita dum kvar monatoj pro malsano. De la ĉapitro "elektro - hejtado" oni devas depreni 3 000 frankojn repagitajn de L.N. Babin. Ni jam parolis pri la neatenditaj elspezoj koncernantaj la lageto kaj la filtrilo de la naĝejo, kiuj ampleksigis la ĉapitron "prizorgado". La reklam-elspezoj tre verŝajne malkreskos en 1985, ĉar nun K.K. estas eldonita per propraj rimedoj de la Kulturdomo.

Koncerne la enspezojn la ĉapitro "mon-donacoj" kreskis ĉar pluraj akcioj kaj kelkaj pruntoj estis transformitaj en donacojn.

Bedaŭrinde la kandidatoj por la senpagaj restadoj en Gresillon proponitaj de Fonduso Belbona Espero ne estas multaj. Novaj alvokoj estos senditaj. La partopreno en la diversaj someraj stud-periodoj anonciĝas simila al tiu de la antaŭa jaro. Inter aprilo kaj junio okazos tagmanĝo dum la ekskurso post la UFE-kongreso, tri mallongaj staĝoj en majo kaj junio.

La rivereto Altrée estis purigita, kio faciligos al aliro al la poplejo. Grava laboro urĝe farota estas la tuta refaro de la elfluejo de la "uzitaj akvoj". La realigo de tiu projekto dependos de la financaj eblecoj. Fine la prezidanto memorigas, ke li ne plu povas sola fronti la multajn zorgojn kaj denove alvokas la bonvolemulojn.

****

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« Vigla lernolibro por la praktikanto »

—

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel aux groupes et aux Libro-Servoj

GRAMATIKO PER BONHUMORO

RECIPROKECO

LA Reciproka Formo esprimas agon (senton, efikon) de persono (aŭ objekto) sur alian personon (aŭ objekton), kiu tute same agas sur la unuan.

— reciproka amo, konfido, antipatio.

— reciprokaj insultoj- reciproki saluton, bondezirojn.

— reciprokeco de la donacoj, de la malbonaj pritraktoj.

— reciproke batalantaj nacioj.

TRI esprim-formoj

RECIPROKE (sin reciproke) (al si reciproke)

— ili komprenas sin reciproke ; ili reciproke turnas al si la dorson ; al ni reciproke ni promesis fidelecon.


UNU LA ALIAN — (unu al alia(j).

— Petro kaj Johano pensas unu al la alia — festoj sekvis unu la alian (unu sekvis la alian) — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al la aliaj — oni ne vidis unu la alian.

INTER SI : vivi inter si harmonie

estus tre utile komunikiĝi inter si

HEZITO ĉe la reciprokeco



Ni ekzamenu la problemo ; mi ĵetas min ĉie tie ; la ŝarkoj kaj mi reciproke atakas nin ; probable, mi mortigos unu ŝarkon, eble du ; sed kio okazos kun la aliaj ? ; ne, la ŝancoj ne estas egalaj ; nepre necesas ke mi elektu lokon pli taŭgan.

« Nu, senvivaj objektoj, ĉu vi havas animon ? »



Ha ! provoso, ĉu vi ne povas senti, ke tiu artaĵo entenas en si multajn revojn, pli malpli fantaziaj ? Ho !, provoso, imagu inter via kaptoto kaj tiu mobilon, la reciprokajn konfidojn, bondezirojn, efektivigeblaĵojn !

Ĉu reciprokeco de la konkludoj ?



— Mi trinkas omaĝe al la inventintoj, kiu kreis la ampolon ! Kiom aĉa estus nia vivo en la obskureco de nia vintraj noktoj ! Kiamaniere komunikiĝi inter ni ? Kiamaniere reciproki pensojn, sentojn, parolojn, gestojn ?

— Eble mankas al vi imagpovon ?

KOREKTOJ

— problemon, ĝi tien, sin.

— fantaziaĵn, kaptito, mobilo.

— kiuj, niaj, imagpovo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (60 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN